

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 09/07/2020 Kvarcentokdekseca eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



### Entute **730,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **285,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **232,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **213,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde julio 2020 ?)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

### Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro. 128



Ni menciis ke, kontraŭe al P.A.G., Zamenhof nomis ĉiujn originajn kombinaĵojn de literoj, aŭ eĉ unu literon, "vorto". Tio do inkluzivas radikon kia "mond" kaj afikson kia "-ind" kaj finaĵon kia "i". Uzi la terminon vorto por ĉiuj tri specoj estas malpraktika, ĉar en la etnaj lingvoj oni nomas "vorto" nur uzeblan vorton, kaj ne ĉiuj Zamenhof'aj "vortoj" estas uzeblaj sen finaĵo. Do mi, kiel parte ankaŭ P.A.G., nomas ĉiujn elementojn de la lingvo "radikoj", aŭ "lingvoelementoj". Sed, escepte de lia terminologio, liaj ideoj estas bonegaj kaj malsamaj al la etnaj lingvoj. Ĉi lastaj havas la sistemon de "fleksio" (inflexion), en kiu la vorto povas iomete ŝanĝiĝi, kiel "sing, sang, sung kaj song" kaj kiel "singen kaj gesungen" kaj kiel "vient kaj venu". En Esperanto, pro Zamenhof, neniuj radikoj povas ŝanĝiĝi (escepte interjekcioj kaj karesvortoj, kiuj ja ne estas radikoj). (daŭrigota). **Marcel Leereveld.**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

# Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Roger Springer



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm ĉe la enirejo de Manlia Varfo aŭ ĉe la Bavarian Beer Café, Manlia Varf, ĉiujn unan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La 4a de julio estis la unua sabato. Venis Chris Holliss, John Casey, Michael Peters, Roger Springer kaj Ian Wylles. Ni iris al la oceana flanko de la Corso ĉar la Bavarian Beer Café, havis limigitajn sidlokojn pro kornvirusaj reguloj.

Roger Springer



### Estrarkunveno

Venonta kunveno: jaŭdo 9-a de julio 2020.



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

## Miaj unuaj sep jaroj post la milito.

### PACO KUN TIMO PRI BALDAŬA TRIA MILITO.



Dum ke la lasta S.A.T.-kongreso antaŭ la milito okazis en Danujo, en Kopenhago, kien la nederlandaj partoprenantoj vojaĝis tra Germanujo per aŭtobuso kun devige kovritaj fenestroj, la unua kongreso post la milito okazis ankaŭ en Danujo, sed en la urbo Aarhus, la precipa urbo de neinsula Danujo. Tiam la traireta parto de Germanujo estis okupata kaj administrata de la brita armeo kiu, por malhelpi ke oni donu manĝaĵojn aŭ valoraĵojn al la germanoj, ordonis ke oni ne rajtu bicikli aŭ aŭtobusi tra Germanujo, sed nur vagonare. En la stacidomo de Hamburgo ni devis resti en la vagonoj kaj ne rajtis doni ion ajn al la surperonaj hamburganoj. Ni tamen renkontiĝis tie kun pluraj Esperantistoj. Tuj post la dan-germana landlimo ni eliris kun niaj bicikloj por bicikli al Aarhus. La vagonaro daŭrigis sian vojaĝon al Kopenhago. Tiuj sen bicikloj vojaĝis pluen per regulaj danaj aŭtobusservoj. Post la kongreso la retroirvojaĝo okazis sammaniere. Al postaj kongresoj, pli proksime, mi plene biciklis.

Tuj post la milito mi estis kaj volis resti senlabora, unue por fari la laboron por Klasbatalo, sed due ĉar mi rekomencis universitatajn studojn. Sed la registara instanco por senlaboruloj postulis, ke mi dungigu ĉe la ŝtata banko de Nederlando, la *Nederlandse Bank*, kiu bezonis oficistojn por prizorgi ĉiujn nederlandajn bankkontojn kiuj neprizorgatis dum la milito. Post kelkaj jaroj tiu laboro finiĝis kaj la banko decidis, por kondukti nacifavore, fari ĉiujn tiujn portempajn dungitojn tutvivaj dungitoj. Sed ĉeestis unu problemo pri mi: la banko kompreneble havis siajn sekretajn sekurecoficistojn kiuj zorgis ankaŭ pri la krima kaj politika sendanĝereco de la oficistoj de la banko, kaj tiuj spionoj kompreneble sciis mian pasintecon

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

politikan, nome kiel marksisma propagandisto en la Esperanta movado. Ili ankaŭ sciis ke mia politika movado ne estis danĝera al la ŝtato: se mi estus estinta membro de la oficiala komunista partio, mi elĵetatus. Sed ili pardonis min kaj akceptis min kiel oficiston en la banko. La sekurecificisto kiu intervjuis min tamen avertis min per “*Maar niet meer van die onzin!*” (“Sed ne plu da tiuj sensencaĵoj”). Kiel rezulto mia nomo kaj adreso ne plu povis aperi en “Klasbatalo”. La banko metis min en la departamenton kiu observis kaj disvastigis la kursojn de la privataj kompanioj kaj ankaŭ la valoron de la nacia monunuo, la “*gulden*”. Antaŭ pluraj jarcentoj la nederlanda monunuo estis la “*daalder*” (de la aŭstra monunuo la “*Thaler*” = *payer*). La nederlandaj koloniistoj de la nuna Novjorko (antaŭe: “Novamsterdamo”) enkondukis sian “*daalder*”, sian monon, kiu poste fariĝis la mono de tuta Usono, sub la bastarda nomo “*dollar*”. La nomo por la aŭstralia mono do vojaĝis el de Aŭstrujo laŭ Holando kaj Novamsterdamo kaj Novjorko kaj Usono al Kanbero.

Dum mia dungisto estis la banko, mi tamen povis, kaj devis, eldoni Klasbatalon, sed mankis la helpo de profesoro *Bruun van Albada*, kiu intertempe akceptis postenon en Indonezio kiel profesoro de astronomio. Sed la laboro en la banko ne plaĉis al mi, kaj mi decidis elmigri al Njuzelando kun mia familio de edzino kaj sesjara filo kaj dujara filino. Sed Njuzelando ne akceptis nin, ĉar mi ne estis manlaboristo. Do mi provis Aŭstralion, kiu akceptis nin, post kuracista ekzameno. Esperantista familio en Nederlando ankaŭ provis, sed Aŭstralio ne akceptis ilin ĉar unu el la tri infanoj havis malfortan okulon kaj portis okulvitrojn. La laboro ne estis la sola tialo por elmigri: ni estis certaj ke baldaŭ eksplodos tria milito, nome inter Rusujo kaj la resto de Eŭropo, kaj ni ne deziris ke niaj infanoj trapasu militon. Anstataŭ tio, Nederlando faris militon en Indonezio, sub nia Esperantista ĉefministro Drees. Kiam ni elmigris al Aŭstralio tre multaj aliaj nederlandanoj faris la samon, kaj la nederlanda registaro decidis uzi ne plu uzatan grandan plezurŝipon por transporti la milon da elmigrantoj, senpage por ili. La ŝipo bezonis unu monaton por la vojaĝo, en Aŭgusto de 1952. Mi ne bezonas priskribi mian vivon kaj laboron en Aŭstralio, ĉar ĝi estas bone konata. Dum la ŝipvojaĝo mi tradukis la sciencan libreton de *Pannekoek* “*Antropogenezo*” (la eknaskiĝo de la homa raso), kiun oni poste eldonis en Francujo.

**Marcel Leereveld.**

## HURA !

Hura!, nun belege kaj flave kaj grandskale floras miaj du akacioj. Unu falis antaŭ kelkaj jaroj surteren, sed daŭras vivi kaj kreski kaj flori. Kutime nur la plej granda branĉo de tiaj arboj falas, sed ĉi tiu teren tiris la tutan arbon.

**Marcel Leereveld.**

## El adelajdo

La 1-an de julio okazis la kluba kunveno de adelajdanoj. La teknika gvidanto de la perreta renkontiĝo estis Sandor Horvath. La ĉefa temo estis la komputila ludo MINECRAFT kaj prezentis ĝin Benno Lang.

Informas **Katja Steele**



Dankon al Marcel pro liaj interesaj rakontoj pri la vivo en la 1930-aj jaroj. Samtempe ni ricevas impreson, ke tiu estis malbona jardeko en la historio de Eŭropo kaj la mondo.

Vidu AE485

**Trevor Steele**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

# Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)

La **Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)** okazos inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto 2020. Vi certe jam legis, ke pro la nuligo de la 105-a Universala Kongreso en Montrealo UEA okazigas nun la Mondan Festivalon de Esperanto (MondaFest' 2020, <http://mondafest.net/>), kadre de kiu okazas la VK. La Festivalo inaŭguriĝis la 20-an de junio kaj la tutan inaŭguron vi povas spekti en la jutubkanalo de UEA: <https://youtu.be/SCMdxElu128>. Plej ĝisdatan programon de la Festivalo vi trovas ĉe: <https://eventaservo.org/e/mondafest2020>.

La VK, kiu estos kulmino de la programo de MondaFest' 2020, estos **senpage por Individuaj Membroj** de UEA, kiuj aliĝos **ĝis la 26-a de julio**. Tial ni afable invitas vin tion fari per <https://vk.mondafest.net/uea-vk/> - reta aliĝilo, kiu ebligas al vi samtempe aliĝi kaj al UEA kaj al la VK.

Kiel membro de UEA vi estas motoro de nia agado por Esperanto. Ni multe faris en 2019: nian agadon vi povas koni ekzemple per la jara raporto de UEA, legebla i.a. ĉe la reta revuo Esperanto: [https://revuoesperanto.org/estrara\\_raporto\\_2020](https://revuoesperanto.org/estrara_raporto_2020).

Nuntempe UEA provizas senpage aŭ subtenas plurajn servojn al esperantistoj, inter ili:

- <http://revuoesperanto.org/>, la Reta Revuo Esperanto;
- <http://eventaservo.org/>, la internacia kalendaro Eventa Servo;
- <http://aktivulo.net/>, la retejo por maturigo de aktivuloj Aktivulo.net;
- <https://uea.facila.org>, la retejo UEA.facila, kun facilaj tekstoj por prezenti Esperanton al komencantoj;
- <https://forumo.uea.org/>, la Forumo de UEA, diskutejo por aktivuloj;
- kaj aliaj ĉe <https://liberapay.com/instigo>.

UEA estas hejmo de ĉiuj esperantistoj. Se vi havas iun malfacilon aliĝi pro financaj kialoj, ne timu kontakti nin por ke ni studu la eblon membrigi vin per subvencio de Fondaĵo Canuto. Aliflanke, se eblas al vi, konsideru donaci al UEA: <https://uea.org/alighoj/donacoj>.

Informas **Katja Steele**



AUSTRALIANS FOR  
WAR POWERS REFORM

La ĉefministro havas la eblecon sole sendi nian militistaron por batali ien en la mondo kaj sen konsulto kun la parlamento <https://warpowersreform.org.au/>

25,499,884 Australianoj

1,439,323,776 Ĉinoj Junio 21, 2020, laŭ la nuna UN statistiko.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**





Nun Aŭstralio aĉetos pli da armiloj. Tio ŝajne ne estas saĝa propono. Pacemaj agoj pli instigas pacon ol minacoj. Estas neniu kialo, kial nacioj povas nur memori siajn proprajn aferojn kaj zorgi pri siaj propraj popoloj. *Roger Springer*



**Ne mordu la manon, kiu nutras vin** Kritiko de Ĉinujo ne helpas iujn ajn en Ĉinujo kaj ne helpas Aŭstralion sed perdigas al Aŭstralio bilionojn da dolaroj per perdo de turistoj, studentoj, merkato pri viando, hordeo, karbo, ktp *Roger Springer*



**26-a de julio - Esperanto-Tago**, tago de lingva justeco.

Post la viruso la mondo bezonas pacon, reciprokan respekton kaj kunlaboron, ne militon kaj perforton!

Lernu Esperanton, la mondan lingvon por kunlaborado kaj paco!

- esperanta | eo | Esperanto (La Internacia Lingvo) - Internacia Lingvo Stefano

Informis AE *Petro Danzer*



**3ZZZ** La elsendo de la 6a de julio 2020 disvastigas la inviton de Kontakto kontribui al la nova rubriko " Kiam mi estis plej feliĉa en la vivo?" ,prezantas Kalocsay al tiuj, kiuj ne aŭ malbone konas lin kaj demandas " Kie estas la duolinganoj?" *FranciskaToubale*

